

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

ESPERANTO EN LERNEJOJN.

Niajn legantojn fremdajn eĉ enlandajn certe interesas teksto de unu el skribaj memorandumoj senditaj de esperantistoj al diversaj ĉeĥaj autoritatoj de nia respubliko. La sekvanta estis verkita de dro. Kamaryt kaj prezentita de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista:

Al ministerio de instruado kaj popola klero!

Kvankam ni ne estis invititaj por la partopreno en la skriba enketo pri la reformo de la duagrada lernejsistemo, tamen ni petas, ke al ĝiaj aktoj estu donita jena nia propono:

Estu en la duagrada lernejo enkondukita deviga instruado de esperanto, nome en la 4. klaso 3 horojn, en la 5. kaj 6. unu horon semajne.

Argumentoj por tio estas jenaj:

1. Studo de esperanto anstataŭos studon de la klasikaj lingvoj, al kiu laŭ la ĝisnunaj rezultoj de la enketo estas en la komuna sesjara bazo estos rezervita tre malmulta tempo, ĉar studo de esperanto havas por celo formaledukita, por logika kaj psikologia juĝkapabligho de la lernanta intelekto, la saman signifon kiel la lingvoj klasikaj. Dum instruado de esperanto oni povas diference de la lingvoj vivaj, al la lernanto ĉiujn regulojn bone argumenti, nome ankoraŭ multe pli precize ol en la lingvoj klasikaj. La gramatiko de esperanto estas lecionaro de la precizeco kaj ekonomio; la horo de esp. estas efektiva praktika ekzerco de la intelekto, kiun oni povas fari dum partopreno de ĉiuj lernantoj. Sed studo de esperanto kondukas ankaŭ al la konscia kono de la lingvo gepatra protektante ĝin kontraŭ malutila influo de la fremdaj vivaj lingvoj. Le legoj pri la derivado de la vortoj devigas mediti kaj serĉi precizan enhavon de ĉiu ideo.

2. Scio de esperanto donas poveblon legi tradukojn eĉ el lingvoj ne tro tradukataj

ESPERANTO DO ŜKOLJ

Naše ĉtenáře cizí i domácí jistě bude zajímavati obsah jednoho z písemných memorandum, podávaných esperantisty různým vedoucím místům naší republiky. Toto bylo navrženo drem Kamarytem a podáno Československým Svazem Esperantistů:

Ministerstvu školství a národní osvěty!

Aĉkoli ĵsme nebyli pozváni k učasti na písemné anketě o reformě střední školy, prosíme přece, aby k jejím aktům byl přiložen tento náš návrh:

Budiž ve střední škole zavedeno povinné vyučování esperanta a to ve 4. třídě společného základu 3 hodiny, v 5. a 6. jedná hodina týdně.

Důvody toho jsou tyto:

1. Studium esperanta nahradí studium klasických jazyků, jemuž asi dle dosavadních výsledků ankety bude na společném šestiletém základě vyhrazeno velmi málo místa, neboť esperanto má po stránce formálně vzdělávací pro zvýšení logické a psychologické schopnosti žákovského rozumu též význam jako jazyky klasické. Při vyučování esperantu lze žákovi, na rozdíl od jazyků živých, všechna pravidla dobře odůvodnit a to ještě daleko přesněji než u jazyků klasických. Mluvnice esperanta je školou přesností a hospodárností, hodina jeho je skutečným rozumovým cvičením, jež lze konati za účasti všech žáků. Avšak studium esperanta vede též k uvědomělému poznání mateřského jazyka, chrání jej proti škodlivému vlivu živých cizích jazyků. Zákony o derivaci slov nutí uvažovati a hledati přesný obsah každého pojmu.

2. Znalost esperanta dává možnost čisti překlady i z jazyků málo překládaných a těžko přístupných, a to překlady daleko věrnější než převod do češtiny, protože umělý jazyk umožňuje vyjádřiti i zvláštnosti cizónárodní myšlenky vyjadřitelné jinak jen jazykem původcovým. Esperantský

kaj malfacile koneblaj, sed tradukojn multe pli fidelajn ol la traduko ĉeĥa, ĉar la artefarita lingvo permesas konservi eĉ specialecojn de la fremdnacia penso direbla iel sole per la lingvo de aŭtoro. Esperanta traduko anstataŭas ĝis tre alta grado direktan rilaton kun la originalo. Ĉe la lernanto oni vekas per ĝi estimon kaj komprenon de la fremdnaciaj specialecoj.

3. Esperanto estas tiel facile lernebla, ke ĝia instruanto povas jam en la 5. kaj 6. klaso de la komuna bazo organizi internacian korespondadon de siaj lernantoj kun junuloj de aliaj nacioj. Per tiu ĉi direkta skriba rilato kun samaĝuloj de diversegaj nacioj kaj kulturoj grandiĝos ĉe la lernantoj tre esence la sento de la tut-homara solidareco, nedisputebla idealo de ĉiuj humanecaj celadoj.

4. Per tiu ĉi korespondado pli riĉiĝos ankaŭ geografiaj, etnografiaj, estetikaj, historiaj, psikologiaj kaj aliaj scioj kaj spertoj.

5. Praktika signifo de kono de esperanto por finintoj la duagradan lernejon estas ekster ĉiu dubo, ĉar ĝi permesas uzi vicon de internacie por helpo de esperanto organizitaj aranĝoj por idealaj eĉ profitodonaj celoj.

Por tiuj argumentoj ni petas . . . k. t. p. Ĉeĥoslovaka asocio esperantista.

preklad mahrazuje do velmi vysokého stupně přímý styk s originálem. U žáka vzbuzuje se úcta a pochopení pro cizojazyčnou zvláštnosti.

3. Esperantu lze tak lehko se naučiti, že jeho učitel bude moci už v 5. a 6. třídě společného základu organisovati mezinárodní korespondenci svých žáků s jinými jazyčnými národy. Tímto přímým písemným stykem s vrstevníky velmi různých národností a kultur zvýší se u žáků velmi podstatně cit všelidské solidarity, kesporný ideál veškerých humanitních usilování.

4. Touto korespondencí obohatí se též žákovy vědomosti a zkušenosti geografické, etnografické, umělecké, dějepisné, psychologické a jiné.

5. Praktický význam znalosti esperanta pro absolventy střední školy je mimo veškerou pochybu, protože dovoluje využití řady mezinárodně pomoci esperanta zorganizovaných zařízení za ideálními i praktickými cíly.

Z těchto důvodů prosíme atd. . .

Svaz československých esperantistů.

P o z n. K 1. bodu důvodu použito podání Jednoty českých filologů, hájící potřebu studia klasických jazyků. Její argumentace mohla být parafrázována, neboť pro esperanto je ještě případnější než pro latinu a řečtinu.

ESPERANTISMO

LA XII. ĜENERALA KONGRESO DE ESPERANTO.

La 8. aŭg. estis en Hago, en la historia »Riderzaal« inauĝurita nia unua postmilita tutmonda manifestacio, nia XII. tutmonda kongreso. La milito forte skuis nian movadon, sed ne renversis ĝin, ĉar la fundoj de nia movado estas tro profundaj. La milito detenis nin de pli intensa vastigo de nia lingvo, ĉar dum ĝi furiozis, kreskis la plej terura nacia malamo piedpremanta ĉiujn idealojn de internaciismo kaj de la humaneco, kiun esperantismo jam per si mem deklaras kaj ĉiam defendas. Ni povas diri kun fiero, ke ni esperantistoj estis la unuaj, kiuj komencis forviŝi la koton ĵetitan sur la malnovajn idealojn humanecajn, kaj ke ni plej unuaj reorganizis niajn vicojn por antaŭenpuŝi la aferon utilan al la ĝeneralaj bezonoj de la homaro. Nia unua postmilita kongreso, kiu pro la nunaj ekonomiaj malfacilaĵoj kaj aliaj cirkonstancoj neniel atingis la abundecon de la kongresoj antaŭaj, estas tamen por ni pli grava ol la jenaj, ĉar per ĝi ni pruvis al

ĉiu kiu havas orelojn por aŭdi kaj okulojn por vidi, ke ekzistas rimedo por forigi la barojn lingvajn kaj gentajn, kiuj dividas homaron en malamikaĵajn partiojn. Ni pruvis, ke Esperanto vivas kaj ĉiam vivos.

La malferman kunsidon de la kongreso prezidis la honora prezidanto so. J. A. Patinje, urbestro de Hago kaj nia altŝatata prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj so. generalo H. Sebert. 42 eminentaj personoj el la rondoj sciencaj, politikaj kaj ĵurnalistaj estis honoraj membroj de la kongreso. Kiel oficialaj delegitoj de ŝtataj registaroj ĉeestis: J. W. Sevenhujzen por holanda ministerio de instruado. Iv. Krestanof por la bulgara ministerio de instruado, Jos. Perogordo por la hispana ministerio de la milito, Alb. Alessio por la itala ministerio de marferoj kaj konsulo Kaczkowski por la pola registaro. La kunsidon partoprenis la ĉeĥoslovaka ambasadoro por Holandio P. Maxa kaj la unua sekretario Dr. Švagrovsky. La La kunsido, gvidata de ing. J. R. Isbrücken el Hago estis komencita per la kantado de nia himno »La Espero«. — Poste sekvis la salutprologoj de la delegitoj de 23 diversaj nacioj el Europo, Afriko kaj Ameriko. Por la ĉeĥoslovakaj esperantistoj parolis la

komercministeria komisario Aŭg. Pitlík el Praha, kiu estis samtempe delegito de la propaganda sekcio de nia Ministerio por eksterlando. La legado de la saluttelegramoj alvenintaj el la tuta mondo (inter ili estis: de Sino. Zamenhof, de so. Zamenhof, frato de la Majstro, de ĉefurbestro de Londono, de profeto Aga en Teheran k. a.) kausis viglan aplaudon de la ĉeestantoj.

En la tri laborkunsidoj oni preparolis aferojn tuŝantajn la Lingvan komitatoni, Akademion, la fondon de Tutmonda ligo esp. kaj oni decidis peti la naciajn organizaĵojn esp. ke ili insiste laboru por enkonduki Esp. en la lernejojn. Generale oni povas diri, ke la kongresa laboro estis tre malriĉa kaj ke ĝi inde egalas la »laborojn« de niaj ĉefaj institucioj »Akademio« kaj »Lingva komitato«.

La lastan tagon de la kongreso, 15. aŭg. alvenis la oficiala invito de la urbestro de Praha, ke la XIII. kongreso okazu en Praha. La invito estis skribita esperante kaj subskribita de la urbestra anstataŭanto inĝ. Rotnágl. Samenhavan inviton sendis ankaŭ Ĉeĥosl. Asocio Esp. kaj la Propaganda sekcio de la Ministerio por eksterlandaj aferoj delegis son. Pitlík por la sama celo. Estis decidite aranĝi la XIII. kongreson en Praha.

Samtempe kun la ĝenerala kongreso okazis la VI. kongreso de U. E. A., V. kongreso de holandaj labor-esp. kaj la sesa kongreso katolika, pri kiu ni raportas aliloke. La laborkunveno de ĉi tiuj subkongresoj havis tre riĉan programon. Kiam ni povos tion diri ankaŭ pri nia »ĝenerala«, kiu preskaŭ ĉiam limigas sin je amuzaĵoj. Por la kongresanoj oni aranĝis esp. prezentadon en la reĝa teatro, koncerton, viziton de la reĝina palaco en Huis den Bosch k. a. La kongreso estis finita per kantado de esp. himno kaj vickado: Je revido en Praha 1921.«

(Laŭ afablaj raportoj de so. A. Pitlík.)

ooo

LA VI. KONGRESO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ.

Tiu ĉi kongreso okazis en Hago 10.—15. aŭg. sub prezido de pastro E. J. Poelle el Holandio. Oni decidis: Fondi internacian organizaĵon katol. en kies komitato oni elektis por tri jaroj: pastro E. J. Poelle (prezid.), Nankivell el Anglio (2. prez.), dr. Max Mielert el Breslau (3. prez.) Ĉiu el la prezidantoj oficos unu jaron. Por la ĝenerala sekretario oni elektis pastron dr. Metzger el Graz (Aŭstrio), ĉe kiu provizore estos la centro de la organizaĵo.

Kiel landaj sekretarioj estis elektitaj: N. Smuders (por Holandio), Dr. Hotzelt (Ger-

manio), dr. Schamanek (Aŭstrio), prof. Alessio (Italio), Marich (Magiario), Dr. Nic. Pfeifer el Košice (Ĉeĥoslovakio), Dombróvski, (Litovio), Kregl (Danio), J. Sgurek (Polio), pastro Smith (Palestino), P. Muffang (Francio), J. Regbergh (Belgio), K. Vidikovski (U. S. N. A.), Parker (Irlando), sino. Milsoon (Svisio), pastro Marresce (Kongolo), N. Bubalo (Jugoslavio), D. Esteller (Venezuelo).

La venonta katolika kongreso okazos en Graz post la ĝenerala kongreso en Praha, ĉar en Ĉeĥoslovakie ne estas konataj kapablaj katolikoj kiuj povus aranĝi la kongreson. La ofic. organo de la organizaĵo estas »Espero Katolika«.

Oni decidis aranĝi komisionojn por traduki esperante diversajn preĝojn, atenti la esperantan preson de malbona enhavo (!) kaj labori por ĝia plibonigo kaj varbi la katolikan pastraron kaj junularon por Esp. Fine oni voĉdonis rezolucion postulantan enkondukon de Esp. en lernejojn kaj en pastrajn seminariojn.

(Laŭ afablaj raportoj de so. A. Pitlík.)

LITERATURO

Dro. Stan. SCHULHOF:

ĈU?*)

Vi, epok' plej granda en la historio,
vi, epok' dum kiu pli da larmoj rulis,
pli da sango fluis ol dum mil' da jaroj
longe forpasintaj, krudaj kaj senbridaj,
vi, epoko sola en la viv' homara,
ĉu vi foje trovos kanton je vi indan
kaj poeton al vi adekvatan,
kiel foje trovis la falinta Troas,
ĝiaj filoj fortaj, ĝiaj malamikoj,
kiuj kvazaŭ granda aro da lokustoj
el parencaj landoj, sur alia bordo,
venis venĝi la honoron de la reĝo.

Ho, feliĉa Troas, sur ruinoj viaj,
sur kelonoj, kaj sur muroj disrompitaj,
kiuj kiel atestantoj de teruraj agoj
superstaris en aero suda milda
kaj en noktoj plenaj de odor' kaj steloj,
poesi' disverŝis sian riĉan kornon,
kaj sur ĉiu floro, kaj sur ĉiu ŝtono
brilis poste al la posteuloj
multekostaj ŝtonoj,, fajr' kaj stelsimilaj.

*) Tiu ĉi poemo. sen titolo, estis trovita en la postlasaĵo de Dro. St. Schulhof kaj kun afabla permeso de Sino. Schulhofová ĝi estis al ni sendita pere de so. dir. Poppe en Pardubice por ĝin enpresi. Ĝi montras sendube, kia majstro estis la mortinta poeto kaj kiun pardon ni suferis pro lia loriro. — Samtempe oni sendis al ni alian versaĵon de la mortinto, kiu meritas specialan priparolon. Ni ĝin enpresos en la venonta numero.

Lerta man' de homo al ni mekonata,
 en jarcentoj postaj tiujn dismetitajn
 erojn zorge levis, kaj kolektis foje,
 kaj ĝis nunaj tempoj la okazintaĵoj
 de la longe forpasinta granda tempo
 ekparolas al ni, al ni ekaperas
 per la vort' de kantoj nobla Iliado,
 kaj kun nom' de Homer' blinda poetestro,

Ĉu, epoko nova, kiu laŭ distancoj
 kaj laŭ nombro de la homoj kaj objektoj
 estas kun la pasinteco sen komparo,
 ĉu sur agoj viaj, urboj disrompitaj,
 ĉu sur kampoj fekundegiĝintaj
 per la sango homa kaj per larmoj varmaj,
 ĉu sur vi, simile al la estonteco
 poezio sternos siajn flugilegojn,
 kaj ĉu ekroviĝos foje hom' aŭ homoj,
 kiuj laŭ ekzemplo de la antikveco
 en bukedom unu ligos ĉiujn florojn,
 kaj per ŝtonoj brilaj, kiuj kristaliĝos
 el la vundoj sangaj, ĝin ornamos lerte?

oooo

KAJ TAMEN!

Rakonto vera kaj preskaŭ instrua.
 El bohema lingvo tradukis F. K. Svačina.
 (Fino.)

Kiam la gepatroj eniris, Manjo plorante
 kuŝis sur la kanapo.

La patro silentis. Lia mano kvietige ka-
 resis la kapon de la filino; poste li foriris
 en sian ĉambron.

Tamen la patrino ekhaltis antaŭ la fili-
 no kaj demandis ekscitiĝe: »Do nenion —
 nenion li diris? Ĉu nek dum dancado
 nek vojire? Nu kompreneble, koketi, —
 tion ĉiuj scias, sed poste, kiam sekvas plu-
 aj ŝancoj, tiam oni lasas provincurban
 amatinton fraŭla! — Tamen ne ploru! Vi
 mem estas kulpa pri tio! Se knabino estas
 fiera kiel vi, se ŝi submetas sin eĉ ne io-
 mete al la volo de viro, tiam, kompreneble,
 oni ne miru! Kaj kiel multe ni elspezis
 nunjare! Kiom kostis ĉiuj tiuj baloj, so-
 cietoj, roboj! Kaj ni tiel bone gastigis tiun
 homon! Nu danke Dion, ke tio jam fini-
 ĝis! Nun ni estos hejme! Ni eĉ ne povis
 pro li ordometi la loĝejon! Tuj morgaŭ ni
 devas depreni kurtenojn malsupren!«

Jam longe antaŭ ol la patrino finis sian
 riproĉpredikon, Manjo ekrektiĝis. »Mi opi-
 nias, patrineto, ke estus pli bone, se ni ne-
 niam estus vivintaj alimaniere ol ordina-
 re«, ŝi diris lace. »Mi mem deziris tion ne-
 niam. Mi ne estus hontinta montri sin tia,
 , kia mi estas, mi estus tre volonte sur-
 metinta unusolan vestaĵon dum tuta vin-
 tro, kaj ĉiam ŝajnis al mi vante vidigi nin
 pli riĉaj ol ni efektive estas. Tio ne celas
 al bono! Ĝuste pro tio mi sentis min an-
 taŭ li neniam libera, neniam tia, kia mi
 estas, meze de ĉi tiu trompo, kiun vi kon-

sideris necesa. — Kaj ne ekcitiĝu plu, pa-
 trino! Mi tute jam rekvietiĝis.«

Sinjorine konsilantedzino glittuŝis per
 manplato sian zorgokonsumitan vizaĝon
 kvazaŭ ŝi volus ion forviŝi. »Antaŭ la tuta
 mondo ni estas ridindaj! Ĉiuj atendis la
 gefianĉiĝon! Cetere mi diris jam: vi estas
 malsaĝa, nekredeble malsaĝa! Foje okazis
 ĝuste sama afero pri adjunkto kaj pri Anjo
 de la poŝtestro. Sed ŝi estis pli saĝa ol vi,
 ŝi lasis sin kisi de li antaŭ homoj kaj la se-
 kvantan tagon ŝi fianĉiniĝis. Sed vi, mi pli
 eble mortigus vin, se iu vin ektuŝus!«

»Evidente mi tro amis lin, patrineto! Kaj
 kiam mi sentis, ke li ne volas aŭ eble eĉ
 ne povas — ah, ni ne parolu plu pri tio, vi
 min ne ekkomprenos! Mia koro estas plene
 plena de honto. La amo postulas sincera-
 con, se ĝi estas elkreskanta kaj floranta.
 Bonan nokton, patrineto!«

Manjo forlasis la ĉambron, kaj la patrino
 rigide okulsekvis sian infanon, kvazaŭ ĝi
 estus fremda persono, kiu ĵus tiel strange
 parolis kun ŝi.

Kuŝante en sia lito, Manjo ne ploris plu.
 Ŝi rigardis kun larĝe malfermitaj okuloj
 en mallumon kaj revigis antaŭ si revoje
 pri sia teliĉo. La printempajn promenojn
 kun Johano Helmiĥ, somerajn ekskursojn
 en ĉirkaŭajn arbarojn, aŭtunajn kaj vin-
 trajn distraĵojn kaj ĝitkuradon; tiun
 agrablan renkontiĝadon sur la stratoj —
 ĉion ĝis hodiaŭa adiaŭo en malvarma
 marta nokto. Kaj eĉ se ŝi ne sciis klarigi al
 si, kiukaŭze la viro, kiun ŝi amis, ne dezir-
 is edziĝi je ŝi malgraŭ ĉiuj ardaĵ vortoj,
 atentemo kaj amindumo, tamen ŝi havis
 maldolĉan turmentigan senton pri kulpa-
 kiu diris al ŝi: »Li ne povis ja — li nepre
 eĉ na konis vin, ĉar vi neniam montriĝis
 al li vere tia, kia vi estas. Vi ludis ja
 grandsinjorinon kaj vestiĝis laŭ deziro de
 la patrino, kiu volis havi lin kiel bofilon.
 Vian junan belecon vi pendokovradis nur
 per abunda parado, vi plidelikatigis viajn
 manojn, kaj ilin atente uzadis, en la hej-
 mo vi nenion ektuŝis, nur por ke viaj ma-
 noj ne estu ree tiel ruĝaj kaj grandaj kiel
 dum lasta vintro. Vi ludis principinon per
 plaĉi al malaltranga oficisto!«

Kiel ŝi hontis nun — kiel ŝi hontis! Ho,
 kiel ĝi estas, ke li jam morgaŭ forlasos la
 urbon, kaj ke ŝi renkontos lin neniam plu
 en zigzagaĵ stratoj de malgranda urbeto!

Tagiĝis, kiam Manjo ekdormis.

Johano Helmiĥ forgesis streĉi sian vek-
 horloĝon. La masrino, ĉe kiu li loĝis, ne
 kuraĝis vekti junan, tiel malfrue revenin-
 tan sinjoron, kaj tial okazis, ke la suno
 lumigis jam la liton, kiam la hieraŭa dan-
 canto levis sian kapon de kapkusenoj.

Sur la fermoplato de malfermita vojaĝkofro kuŝis lia frako kaj sur la planko estis disŝutitaj biletantaj kotiljonaj steftoj. Ekstere sub fenestroj pepis paseroj kvazaŭ la printempo estus dumnokte triumfe enveturinta, kaj sole la vekhorloĝo sur nokta tableto obstine silentis kaj senmova montrilo vidigis la horon, je kiu li en la lasta nokto adiaŭis blondharan Manjon. Li ellitiĝis saltrapide.

»Sinjorino Černá!« li indigne vokis tra duonfermita pordo. »Mia vekhorloĝo ne funkcias. Mi opinias, ke ne estas ankoraŭ la sepa horo. Ĉu ne vere?«

»Nu — la deka,« estis kvieta respondo. »Mi opiniis, ke sinjoro inspektoro sate dormos kaj posttagmeze forveturos.«

»Vi estis absolute renion opinionta!«, kriis la luinto en unua surprizo.

»Vi estis vekonta min!«

Tamen poste li estis tute trankvila kaj silentis.

Sur la korto ludis gurdisto. Ĝuste la saman melodion, laŭ kiu Helmih kun Manjo ankoraŭ hierau dancis, la saman, kiu ne elviŝiĝis el lia kapo, kaj jen ŝajnis al li, ke li ĝis nun tenas junan knabinon en la brakoj, tiun, kiun li sekrete tiel multe amis.

Kaj subite li rememoriĝis pri malgaja rigardo de ŝiaj bluaj okuloj, kiam ili disiris. Ĉu tio estis vera amoloro? Li tre ŝatus forporti ŝian bildon en sia koro. Eble ĝi eĉ ne estis tiel malbone, ke li maltrafis matenan vagonaron. Li estas ja nur morgaŭ prezentonta sin en nova oficejo. Li plenumos tion ankau, se li uzos vesperan rapidvagonaron. Eble li ekvidos ankoraŭ unufoje Manjon, eble li renkontos ŝin en sunlumigitaj stratoj.

Kial ŝi estis tiel distraĵavida? Kial ŝi ne estis malgranda, kvieta mastrinetto, kiu kuiras, kudras ordometas kaj rebonigas — ĝuste tiel, kiel li bezonas tion al sia monnata salajro? Eble li domaĝus tiujn delikatajn blankajn manetojn, tiujn belegajn kostumojn, sed tio estus feliĉo. granda dolĉa feliĉo, se li estus povinta trankvile diri: »Iru kun mi, estu mia edzino, kunulino en ĝojo eĉ en malĝojo — mi ja tiel multe amas vin, vi malgranda, ĉarma knabino!«

Domaĝe, ke ŝi ne estas almenaŭ riĉa! Sed havante malgrandan salajron, li ne povis edziĝi je ŝi, kiu nenion sciis krom parade vesti sin kaj amuziĝi!

Li surmetis sian vojaĝvestaĵon, enpakis la lastajn objektojn en la kofron kaj enpenŝiginta li ekiris en tagmeza sunlumo tra degelanta neĝo la saman vojon, sur kiu li iris en la nokto.

»Si estos surprizita, kiam ŝi ekvidos min ankoraŭ unufoje,« li pensis. Ĉi tiu lasta neatendita vizito lin ĝojigis. Tion li ĝis nun neniam faris, veni seninvite. Bona sinjorino konsilantedzino certe ne estos ankoraŭ en la tualetto, pri kiu ŝi ĉiam tre zorgis kaj Manjo —

La fenestroj de loĝejo de la konsilanto estis plenlarĝe malfermitaj, sur multaj fenestroj mankis kurtenoj. Johano ne komprenis tion. Kion ĝi signifis?

Suprenirante sur la ŝtuparo, li aŭdis barelsonan frapadon. La antaŭĉambro estis plenlarĝe malfermita, neniue aŭdis kaj vidis lin kaj ĉie staris seĝoj, foteloj kaj kuŝis tapiŝoj.

Subite en lia kapo eklumiĝis — ĝenerala ordometo en la domo. Plej unue li preparis sin foriri. Li neniam ŝatis ordometon. Tamen li decidigis alie. Neekomprenebla scivoleco pelis lin pluen, li liberigis al si la vojon tra tiu tuta haoso ĝis fine li ekhaltis mirigita en malfermita pordo de la loĝoĉambro. Ĉi tie staris la ŝtupetaro, malfirmigita kaj malnova kaj sur ĝi, sur la plej supra ŝtupeto staris Manjo kun blondaj haroj ĉirkaŭigitaj per ruĝa tuko kaj havante larĝan mastrinan antaŭtukon, ŝi purigis surplafonajn ŝtukaĵojn.

Antaŭ ĉio Johano forte ekprenis la malfirmiĝantan ŝtupetaron. »Pro Dio, fraŭlino Manjo, vi defalos!« li vokis.

Ŝi ne kriis, sed ankaŭ ne malsupreniris, ekvidinte lin. Ŝi firme alpremiĝis al muro, kaj ŝia pala vizaĝeto apenaŭ kontrastis je kalkita muro.

»Venu ja malsupren!«, li petis. »Mi iros al vi renkonte.«

Li ne vidis timkonsternan ekrigardon de bluaj okuloj. Li vidis sole bluan antaŭtukon, ruĝan kaptukon kaj senpolvigilon — kaj tutan ordometadon.

Manjo mankovris siajn okulojn, farinte la unuan paŝon malsupren. Ŝi ne sciis la kialon, sed ŝi ne volis, ke li vidu ŝiajn larĝojn. Ŝi absolute ne pensis pri sia stranga tualetto; ŝin ekregis tiel grandega feliĉo pro tio, ke ŝi lin ankoraŭ unufoje vidas, ke ŝi eĉ ne sciis kion fari. Ĉu eble ŝi songis? Ĉu ŝi ne akompanis lin hodiaŭ matene en siaj pensoj post la urbon al la stacidomo — kaj poste ĉiam pli kaj pli malproksimiĝantan?

Jes, ŝi revis. Pro tio ŝi forgesis pri ordometo kaj pri sia tualetto. Ŝi staris nun sur la dua ŝtupeto, poste sur la tria kaj fine ŝi ne bezonis malsuprenpaŝi plu. Ŝi estis ekkaptita, levita, kaj fortaj brakoj starigis ŝin sur la plankon.

Sed kiukaŭze ne liberlasis ŝia ĉi tiuj fortaj brakoj? Kial ili premis ŝin tiel ege?

»Manjeto!«

Preskaŭ inace ekvokis tion sinjorino konsilantedzino. Kun suprenfaldita jupo ŝi ekhaltis en la pordo kaj rigardis du junajn homojn, kiuj interkisis sin, tiel arde sin interkisis meze de ŝia dislokita meblaro, kvazaŭ ili starus sub florantaj arboj kaj nenio alia estus ĉirkaŭe ol nur suno, floroj kaj poezio.

Kaj sinjorino konsilantedzino ne povis tion ekkompreni. —

NACIA VIVO

GERMANAJ LERNEJOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Germanoj en Ĉeĥoslovakio plendas en siaj gazetoj pri perfortado de iliaj lernejoj. Ke tiu ĉi plendo estas senbaza kaj maljusta, atestas sekvanta statistiko:

Post la revolucio tiuj ĉefaj gelnantoj, kiuj estis en germanaj lernejoj, lasis sin enskribi en ĉefan lernejon kaj sekve de tio estis urĝe kelkajn germanajn klasojn nuligi.

Nuligita estis germana popola lernejo en Praha III., kiu havis sole 25 lernantojn en 5 klasoj(!). En ĝia unua klaso estis unusola lernanto. En kvartalo »Staré Město« en Praha estas bodiaŭ kvin klasa germana popola lernejo kun 133 knaboj kaj alia germana kvin klasa lernejo kun 193 knabinoj. En kvartalo »Nové Město« en Praha estas germana popola lernejo kun 171 knaboj kaj knabina lernejo kun 95 lernantinoj en 9 klasoj. La triklasaj burĝaj germanaj lernejoj en Praha havas ankaŭ paralelklasojn kaj nur 138 knabinojn. Germana popola lernejo en Smíchov havas en 3 klasoj 140 gelnantojn. Antaŭ la revolucio havis tiu ĉi lernejo 14 klasojn. En Žijkov restis 2 germanaj klasoj kun 97 gelnantoj; antaŭ la revolucio estis tie 10 klasoj. Nuligitaj estis sekvantaj germanaj populaj lernejoj pro absoluta manko da lernantoj: en Nová Ves apud Třeboň kun 13 gelnantoj, en Sulislav kun 15, en Kněžice kun 13, en Sušice kun 11, en Příbram kun 9 lernantoj. Ĉiu justa homo devas konfesi, ke por tiu tro malgranda nombro de gelnantoj ne povas la respubliko pagi elspezojn. Ĉe kelkaj germanaj populaj lernejoj estis nuligitaj nur kelkaj klasoj: en Hodkovice estis pli frue 169 gelnantoj en 8 klasoj, nun estas tie 4 klasoj, en Č. Dub 79 gelnantoj en 5 klasoj, nun estas 2 klasoj, en Louka 161 gelnantoj en 6 klasoj, nun en 3 klasoj, en Terezín estis 66 gelnantoj en 5 klasoj, nun en 2 klasoj, en Čižkovic 84 gelnantoj en 4 klasoj, nun en 2 klasoj, en Tuchomyšl 144 gelnantoj en 5 klasoj, nun en 3 klasoj, Třemošná 30 gelnantoj en 2 klasoj, nun en 1 klaso, en Františkov 37 gelnantoj en 2 klasoj, nun en 1 klaso, en Pohled 38 gelnantoj en 2 klasoj, nun en 1 klaso, en Brněnec 32 gelnantoj en 2 klasoj, nun en 1 klaso, en Doubí 108 gelnantoj en

4 klasoj, nun en 2 klasoj, en Dolní Tannwald 110 gelnantoj en 4 klasoj, nun restis 2 klasoj, en Dol. Roketnice 137 gelnantoj en 5 klasoj, nun en 4 klasoj.

En Moravio restis tiuj ĉi germanaj populaj lernejoj malgraŭ tio, ke ili ne havas la ŝuleĝan nombron de gelnantoj:

En Podivín estas 2 klasa germ. popola lernejo kun 17 gelnantoj, en Hlodonín 5 klasa kun 124 gelnantoj, en Ivančice 4 klasa kun 23 gelnantoj, en Modřice knaba burĝa lernejo kun 53 lernantoj, knabina kun 48 lernantoj, en Boží Požehání 4 klasa kun 22 gelnantoj, en Flandorf unuklasa kun 13 gelnantoj k. t. p.

En Brno estas en ĉefaj populaj lernejoj en 149 klasoj sume 5545 gelnantoj, do 37 en unu klaso, en germanaj populaj lernejoj nur 3908 gelnantoj en 160 klasoj, do 24 gelnantoj en unu klaso; en ĉefaj burĝaj lernejoj 2335 gelnantoj en 61 klasoj, do 38 gelnantoj en unu klaso, en germanaj burĝaj lernejoj en 80 klasoj 2217 gelnantoj, do 27 gelnantoj en unu klaso. — Ĉu tion oni povas nomi perfortado?

♦♦♦♦

UNUA PROPONO POR KONSTITUCIIGI LIGON DE NACIOJ.

Historie kaj ankaŭ aktuale estas interesa fakto, ke la unua serioza propono por konstituciigi Ligon de nacioj aperis sur teritorio bohema (ĉeĥoslovaka). Bohema reĝo Jiří z Poděbrad (Georgo de Poděbrady) proponis jam en jaro 1463 Ligon de eŭropaj regnestroj, kies ĉefaj principoj frapante similas al ĉefaj decidoj de la unua Ligo de Nacioj.

Historio rakontas: Estis malpermesite al la membroj de la Ligo propravele komenci militon: pri milito kaj paco rajtis decidi nur la Ligo. Disputojn inter la membroj forigu organoj de la Ligo; batalo inter la membroj estu malebligita. Ankaŭ malharmoniojn inter la membroj kaj aliaj ŝtatoj kaj eĉ malkonsentojn inter fremdaj, nemembraj ŝtatoj la Ligo ordigi. Se la penado ne sukcesos, la Ligo helpu tiujn membrojn aŭ partion, kiuj subiĝis je ĝia decido. Ĉiuj membroj gardu severe komunan pacon.

Kiel ĉeforgano de la Ligo estis proponita Kolegio de rajtigataj delegitoj de ĉiuj regnestroj; ĉiu nacio reprezentigu tie per unu voĉo; antaŭ de voĉdonado de la Kolegio estis nesesa antaŭa voĉdonado en »naciaj kurioj«. Kiel prezidanto (praesidense pater) estis elektonta la franca reĝo.

La Ligo estis havonta siajn blazonon, sigelon, kason kaj arĥivon; oficistoj estis elektotaj en la portempa restadejo de la Ligo. Kiel unua restadejo estis konsiderota Basileo (Basel).

(Daŭrigo.)

DIVERSAĴOJ

Io neagrabla! La preskostoĵoj en la nuna jaro atingis tian altecon, ke spite la subtenado de esperantistoj en Plzeň la enspezoj ne sufiĉas por kovri la elspezojn. La administracio de «La Progreso» estas bedaŭrinde devigata plialtigi la prezon de la jarabono jam en tiu ĉi jaro je 4 Kč., kiujn la ĉeĥosl. abonantoj bonvolu sendi per la poŝta transpagilo sendota al ili en venontaj tagoj. La administracio esperas, ke malgraŭ la enorma, sed por la ekzisto de nia gazeto tute necesa plikarigo, ĉiu ĝisnuna abonanto restos al ni fidela.

Kio ĝi estas? Sub tiu ĉi titolo ni enpresis en nia juna numero noton pri so. F. V. Lorenz. Nun ni ricevas de li leteron, en kiu li sciigas la jenom: . . . Estas vere, ke Ido estis plaĉinta al mi kaj mi propagandis ĝin en Brazilio eldonante eĉ portugallingvan gramatikon kaj vortareton. Sed dum la jaro 1915 mi forlasis ĝin, kiel mi deklaris publike en la «Astro» kaj la «Brazilia Esperantisto» de majo-junio 1915. Jen la teksto de tiu deklaro: »Estimataj Samideanoj, Kiel Vi scias, Ido altiris mian simpatian kaj mi decidis min propagandi ĝin, konjektante, ke tiel mi laboros por la »plej bona lingvo internacia«. La senĉesaj atakoj de la idistaj ĉefoj kontraŭ la respektinda Dro. Zameuhof, la ĉiam plimultiĝantaj kaj praktikneutilaj ŝanĝoj, kiujn la Idista Akademio enkondukis en la sistemon kaj la lingvistikaj laboroj de so. René de Saussure kaj aliaj scienculoj, konvinkis min, tamen, ke mi estas en erara vojo, ke la plibonigoj prezentitaj de Ido estas nur ŝajnaj kaj ke Esperanto taŭgas vere multe pli bone por la rolo de la lingvo internacia. Tial mi detruis la restantajn ekzemplerojn de nia gramatiko kaj vortareto de Ido kaj refariĝas ano de la Esperantistaro, pri kio mi jam sciigis la multajn personojn, kiujn mi estis iginta simpatiaj por Ido.« Salutaute Vin kore, mi restas Via samideano kaj samnaciono tre dankema, Francisko Valdomiro Lorenz, professor em S. Feliciano, Brazil. — Kun vera ĝojo ni ekceptis ĉi tiun sciigon, kiu per si mem estas tre instrua por niaj idistoj. Ni estas certaj, ke 99% da Idistoj agus egale, se ili estus tiel prudentaj, tiel honestaj kaj tiel senpartiaj kiel so. prof. Lorenz.

Paroladoj de so. Pitlik. Nia vigla samideano so. Aug. Pitlik, komercministeria komisario el Praha, faris dum kaj post la kongresa semajnovicon da paroladoj: en Hago li paroladis la 10. aŭg. (kun 120 lumbildoj) pri Praha, ĉeĥoslov. baburboj, Tatramontaro kaj pri la sokolara kongreso. La paroladon partoprenis la ĉeĥosl. ambasadoro P. Maxa kaj la oficistaro de la ambasadorejo. Al la ĉestantoj oni disdonis la specialan numeron de «La Progreso» dediĉita al prezid. Masaryk. — En Leipzig aranĝis la bohema societo «Neruda» kaj ĉeĥosl. vinkonsulejo la 18. aŭg. en la granda halo de »Westendhalle« paroladon de so. Pitlik, dum kiu li menciis Esperanton kaj la kongreson en Hago. — La 19. okazis kunveno de la esp. en Leipzig en la Saksa Esp. instituto, kie so. Pitlik raportis pri la kongreso. — La Esp. klubo en Praha aranĝis la 27. aŭg. esp. parola-

don de so. Pitlik pri la kongreso en Hago. — Efektive, so. Pitlik faras estimindan laboron por Esperanto.

Antau grava laboro staras la tuta ĉeĥoslovaka esperantistaro, kiu havas la honoron aranĝi la XIII. kongreson. Kiel ni laboros por la kongreso? Antaŭ ĉio oni aranĝu ĉie plej multajn kursojn, oni skribu en la naciolingvaj gazetoj pri la esp. movado, oni perfektigu en la esp. parolado kaj: ni kolektu monon por la kongresaj aferoj. Samideanoj! Ĉiu el Vi donacu almenaŭ 10 kronojn al la kongresa kiuo, ĉar sen mono la loka kongresa komitato (kiu estos elektita en proksimaj tagoj) ne povus labori. Se ĉiu el vi kunlaboros, tiam la XIII. estos la plej bela internacia manifestacio Fremdlandanoj ŝparu por la vojaĝo al Praha jam de nun. Ĉiu povos partopreni, ĉar danke al la valuta diferenco vi vivos en Praha tre malkare!

BESA. Adresaro II. Eldono, somero 1920, kiu enhavas adresojn de la esperantistoj el ĉiuj landoj, jam aperis; ĝi kostas 6 Kč. Mendu ĝin ĉe la Bohema Esp. Servo en Moravany, Ĉeĥoslovakio.

En Estonio nia movado plivigliĝas. Organiziĝis memstare la »Estonia Esp. Unuiĝo Espero« en Tallin. Rütli t. G. Ĝiaj membroj deziras korespondi.

Scubor všech zákonů, nařízení i výnosů veřejného zásobování se týkajících jest důležitá, toho druhu jediná úřední publikace, nezbytná pro všechny úřady, obce, korporace, družstva, konsumy i pro veškeré obchodníky, rolníky, mlynáře, průmyslníky i živnostníky, kterou vydalo ministerstvo pro zásobování lidu péči svého Tiskového odboru a jejíž celá první část nákladu je již rozebrána. Ačkoli pak nyní po velkém zdražení papíru stoupla cena knih i publikací více než dvojnásobně, přece každý, kdo dilo ono neprodleně, nejdéle do konce tohoto měsíce objedná a současně zaplatí poukázkou nebo složenkou pošt. spořitelny či osobně v Tiskovém odboru ministerstva pro zásobování lidu v Praze III., Strakova akademie, obdrží uvedenou publikaci za nezvýšenou cenu 15 K. což je obnos za objemnou knihu o 520 stranách formátu velké osmerky jistě nepatrný.

0000

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresoj kostas Kč. 1.—)

Plzeň, (Ĉeĥosl.), Křížkova ulice 9. So. Josef Štrunc interŝanĝas p. m.

Plzeň, (Ĉeĥosl.), Říšská ul. 5. So. Jos. Krs, interŝanĝas p. m.

Plzeň, (Ĉeĥosl.), So. O. Slavík, deziras koresp. kun ĉiulandaj samideanoj.

Karlín, (Ĉeĥosl.), Královská 114-96. So. Josef Fink dez. korespondi kun ĉiulandaj esp. per p. k. Li interŝanĝas p. m., gazetojn kaj fotografajojn. Li ĉiam respondos.

Jičín, (Ĉeĥosl.), Husova 324. So. A. Šikl, studento, deziras interŝanĝi p. k., let. kaj p. m. kun ĉiuj landoj.

Střešovice ap. Praha (Ĉeĥoslovakio). So. Jago Větrník, deziras koresp. per il. p., kaj interŝanĝi p. m.

Bytčochov 85., poŝto Jizerodol, ap. Semily (Ĉeĥosl.) So. Jos. Malý, deziras interŝanĝi

opiniojn pri la sveneborgianismo kaj pri diversaj religioj.

Užhorod (Subkarpatata Rusio, Ĉeĥoslovakio). So. Aleksandro Spire, deziras korespondi per urbvidadoj kun ĉiuj landoj. Afranku bildflanke. Li ĉiam respondos.

Leandro N. Alem F. C. P. (Argentino). So. Manuel Noelle Güell, deziras interŝanĝi p. k. (markojn bildfl.) p. m., gazetojn k. t. p. Li ĉiam tuj respondos.

Tulanka, poŝto Kapušany (Jugoslavio). So. Nikolo Ilkovič, studento, deziras korespondi per. il. p. kaj. let.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

(Při objednávece poštou nutno připočísti poštovné).

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný Kč 7.50
 Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
 Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kč 4.50
 Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Kč 6.—
 Čejka: Slovník esperantsko-český, obsáhlý, brož. Kč 7.50
 Slovník česko-esper., malý, brož. Kč 3.—
 Kühnl: Úplná učebnice esperanta:
 a) vázaná v plátěném hřbetě Kč 14.40
 b) vázaná v papíru Kč 12.—
 c) celoplátěná vazba Kč 16.40
 Kühnl-Procházká: Slovník česko-esper.:
 a) vázaný v plátěném hřbetě Kč 21.60
 b) brožovaný Kč 18.—
 c) celoplátěná vazba Kč 24.—
 Vortoj de Zamenhof, na obyčej. papíře Kč 4.50
 Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře Kč 6.—
 Sherlock Holmes Kč 4.50
 Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
 Průvodce Prahou Kč 3.60
 Klíč esperanta Kč —.30
 Co je esperanto Kč —.20
 Časopis Českých Esperantistů, ročníky I.—VIII., po Kč 5.—
 Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo Kč 12.50
 El proksima oriento Kč 9.—

ĈEĤAJ SAMIDEANOJ en Italio kaj Francio.

Kiu volus interŝanĝi unufoje monate dimanĉajn numerojn de tagaj aŭ ilustritaj italaj aŭ francaj gazetoj kontraŭ la ĉeĥaj? - **Václav Němec**, banka prokuristo, Karlovy Vary-Karlsbad, Ĉeĥoslovakio.

Objednejte si slovník Esperantsko-český

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.

Cena brož. Kč 4.—, v plátěné váz. Kč 7.—.

Laŭ interkonsento kun la eldonantaro de

ESPERANTA FINNLANDO

estas tiu bela kaj riĉe ilustrata gazeto abonebla por Kč 24.— jare ĉe

Administracio de „La Progreso“
 Plzeň Poděbradova 6.

Somero 1920 Ĵus aperis 2.-a eldono

BĚS-a

ADRESARO

de l'Esperantistoj el ĉiuj landoj

Prezo: 6.— Kč

(fremdlande: 1'50 Fr. sv., pagebla papermone, poŝtmarke aŭ respondkuponoj).

Rabato por opaj mendoj.

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Moravany, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, Eŭropo.

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 2'70 Kč, 100 kusů 24.— Kč.

Vešk. informace o Esperantu

přináší brožurka J. ŠUPICHOVÉ, kterou vydal „Kroužek esperantistek“ v Praze:

Učte se Esperantu

Cena 1 výtisku poštou 60 h, při větší objednávce sleva. Objednávky vyřizuje sekretářka Kroužku sl. Sidonie Dlouhá v Praze, Wilsonovo nádraží

Filatelistoj! Mi povas liveri Franc. kolonmarkojn en la sekv. prezo:
 25 diversaj de Fr. Kolonioj 10 Kč
 50 22 „
 Ankaŭ „esperantaj glumarkoj estas riĉe-veblaj prezo de 100 pecoj 4 „
 Afrankaĵo **Alojzo Janza**, Žilina, malsame. Poŝtfako 26.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.